SPECIALA NUMERO
DE POLLANDA EKSPOZICIO ĜENERALA.

# POLA ESPERANTISTO

JARO XXIII. * JULIO 1929. * NR. 7.

ROK XXIII. * LIPIEC 1929. * NR. 7.

# ESPERANTYSTA POLSKI

VENU AL POZNAN, POR VIZITI ĜIN.

WYDAWCY: ELDONANTOJ: POLA ESPERANTISTA KLUBO & SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES: KRAKÓW, ULICA LUBICZ Nr. 34.

REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTO

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8·—, półrocznie Zł. 4·—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem roczna prenumerata Zł. 6·—.

ABONO: jare Zł. 8·—. duonjare 4·—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6·—

Konto Pocztowej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

| OGŁOSZENIA: | | ANONCOJ: | |
|---|---|---|---|
| 1 strona | Zł. 60·— | 1 paĝo | Zł. 60·— |
| 1/2 strony | „ 32·— | 1/2 paĝo | „ 32·— |
| 1/4 strony | „ 17·— | 1/4 paĝo | „ 17·— |
| 1/8 strony | „ 10·— | 1/8 paĝo | „ 10·— |

TREŚĆ — ENHAVO:

**DR. STAN. WACHOWIAK:** POLLANDA EKSPOZICIO ĜENERALA. **BUJWID:** P. E. Ĝ. KAJ POLLANDA KONFERENCO ESP-A EN POZNAŃ. **I. DRATWER:** PENSOJ PRI LA EKSPOZICIO. **I. LEJZEROWICZ:** LA ĜENERALA LANDEKSPOZICIO. **DR. L. DREHER:** IMPRESOJ EL POZNAN'A KONGRESO DE ESPERANTO 29—30 JUNIO. **J. ŜAPIRO:** DEK JAROJ DA ŜTATA VIVO DE POLUJO. **TAD. HODAKOWSKI:** OPINIOJ DE FREMDLANDAJ DIPLOMATOJ PRI P. E. Ĝ. **FEZ.:** MISS ESPERANTO. **LASTAJ INFORMOJ PRI KONGRESO EN BUDAPEST. INTERNACIA KONGRESO POR KOMERCA KLERIGADO EN AMSTERDAM. PEDAGOGIA KONGRESO EN HELSINGOER. OD REDAKCJI.**

# POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE.

# ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ.

ROK XXIII. JARO. | KRAKÓW LIPIEC 1929 JULIO | Nr. 7 N-o


Moto: „...venas tempoj, kies
signo estos vetkuro de laboro,
kiel antaŭe estis vetkuro de fero,
kiel antaŭe estis vetkuro de sango..."
**Józef Piłsudski**
Marŝalo de Polujo.

Motto: „...idą czasy, których znamieniem
będzie wyścig pracy,
jak przedtem był wyścig żelaza,
jak przedtem był wyścig krwi..."
**Józef Piłsudski**
Marszałek Polski.

## POLLANDA EKSPOZICIO ĜENERALA.

Alfred Picard, granda organizinto de Pariza Ekspozicio en j. 1900 skribis: „La mondekspozicio en j. 1900 devas fariĝi filozofio kaj sintezo de la jarcento, devas posedi samtempe grandecon, belecon kaj ĉarmon, devas respeguli genion de Francujo kaj montri, ke hodiaŭ kiel hieraŭ ĝi paŝas sur fronto de l' homa progreso". Tiel povis diri la homo, kiu havis kun si opinion de l' potenca ŝtato kun malnovaj tradicioj kaj nemezureblaj riĉaĵoj. Kaj li ne eraris, ĉar la Pariza Ekspozicio estis unu el la plej grandaj komunaj faroj de la homaro. La budĝeto de l' ekspozicio mem atingis 117.000.000 da oraj frankoj, kaj ĝia influo je disvolviĝo de ekonomiaj kaj kulturaj rilatoj en tuta Eŭropo estis potencega. Ne estas necese aldoni, ke ankaŭ aliaj ŝtatoj, organizante montron de siaj kulturo kaj produktado, ne ŝparis kelkfoje grandegajn sumojn, por levi landan produktadon kaj eksporton, por fortigi siajn influojn politikajn en la mondo.

10 jaroj pasas en la nuna jaro depost subskribo de l' Traktato en Versailles. Historia justeco redonis al Polujo, disŝirita dum preskaŭ unu kaj duona jarcentoj, sendependan ŝtatan ekzistadon. Historio juste pritaksos, kiel grandega necesis fortostreĉo, por ne nur la landon rekonstrui post la eŭropa brulego milita, sed ankaŭ plifortigi ĝian ekonomian vivon, sen kiu la ŝtato ne povus politike persisti. Efikojn

de tiuj-ĉi laboroj devas elmontri unua en libera Polujo Ekspozicio Ĝenerala.

Delonge ĝermis la penso organizi en ĉefurbo de la ŝtato revuon de niaj kulturaj kaj ekonomiaj atingitaĵoj de lastaj jaroj. Jam en j. 1924 oni proponis aranĝi en Warszawa internacian ekspozicion. La projektintoj, kiuj estis inspirataj de plej noblaj intencoj, tro malkomplike la aferojn imagis. Nome, ili supozis, ke tiel grandega aranĝo estas organizebla en kelkaj monataj, kio nur pruvas, ke ili tute ne konis eĉ proksimume malfacilaĵojn, kiujn havigas organizado de grandaj ekspozicioj eĉ en ŝtatoj, kiuj disponas rimarkidajn materialajn rimedojn, kaj, kio estas same grava, riĉan sperton. Do la penso baldaŭ falis kaj estis denove subtenata nur en j. 1926 de urbo Poznań, iniciate de urbestro Ratajski, kiu trastudinte Ekspozicion de Brita Imperio en Wembley, konkludis, ke, volante organizi en Polujo Landan Ekspozicion, estas necesaj almenaŭ du jaroj.

La plej malfacilan taskon prezentis organizo de financoj de l' Ekspozicio. Nia pozicio estis ĉi tie tute alia ol ĉe ĉiuj aliaj eksterlandaj ekspozicioj, ĉar ili tie ricevadis antaŭe precize prikalkulitan budĝeton kaj en ĝiaj kadroj ili devis mastrumi. Alie estis ĉe ni. Ni devis ne nur konstrui la Ekspozicion, sed ankaŭ klopodi pri ĉiu tiucele bezonata mono. Kaj ĉi tie temis, pri sumoj, en niaj modestaj rilatoj, grandegaj. Sufiĉas montri nur budĝeton de la Ekspozicio: 15.000.000 zł., ne parolante jam pri budĝetoj de la Registaro, de l' urbo kaj de la eksponantoj. Por doni bildon pri la financa organizo de l' Ekspozicio, oni devus skribi dikan volumon, do mi devas limigi min al konstato, ke laboroj, kiuj estis faritaj en ĉi sfero, estas eksterordinaraj. Kaj kion diri pri konstruado? La tuta teritorio de l' Ekspozicio etendiĝas sur pli ol 600.000m², sur tiu spaco oni konstruis pli ol 130.000 m² da konstruaĵoj. Pri teknikaj laboroj oni povus imagi multediran bildeton, se oni pripensos, ke oni movis pli ol 150.000 m² da tero. Ne pli malgranda fortostreĉo estis necesa rilate propagandon, kiu en dekkelk lingvoj de la mondo atingadis la lastajn anguletojn de l' tero.


En P. E. Ĝ. estas reprezentata la tuta industrio, metio, agrikulturo, fizika edukado kaj sportoj, elmigrado, belaj artoj. La Registaro de l' Respubliko prezentas en la speciala registara palaco tuton de l' ŝtata perlaboraĵo dum la lasta jardeko. Ni vidas tie ĉion, komencinte de agado de Ministrejo de Publika Klerigado kaj finante ĉe Ministrejo de Justeco. Aparta „Gaja urbeto" klopodas pri deca distro por la gastoj. Sur la tuta teritorio estas kelkaj grandaj restoracioj, poŝtaj kaj trafikaj aranĝoj. Mi vane penus en mallonga okaza artikolo priskribi ĉion, eĉ supraĵe, kio etendiĝas sur la Ekspozicio antaŭ niaj okuloj. La industrio mem havas ronde 2000 eksponantojn. Agrikulturo pli ol 1200, ne parolante jam pri miloj da eksponantoj de aliaj sferoj. Kelkaj dikaj volumoj de katalogoj enhavas nomaron de ĉiuj eksponaĵoj de l' Ekspozicio.

Do mi ne troigos, se mi asertos, ke la Ekspozicio laŭvorte mobilizis ĉiujn kreajn fortojn de nia Ŝtato. Ĝi funkciigis milojn da laborejoj, donis okupon al multaj miloj da laboristoj. Ĝi vivigis grandegan movadon ne nur en Poznań mem, sed en tuta Polujo. Por ĝi laboradis ĉiuj metiejoj, laboristoj, artistoj, pentristoj, skulptistoj, scienculoj. Tiel grandega fortostreĉo estis ebla nur dank' al tiu cirkonstanco, ke

antaŭ la granda verko, kiun la nacio konstruis, silentis ĉiuj internaj kvereloj kaj malpacoj.

La signifo kaj la valoro de P. E. Ĝ. konsistas en tio, ke ni egaliĝis laŭ laboro al la plej eminentaj ekzemploj de eksterlando. Oni devas ankaŭ pripensi, ke P. E. Ĝ. estis verkata en neplene du jaroj. La gravecon de tiu fakto nur tiu povos kompreni, kiu almenaŭ proksimume konas malfacilaĵojn, kiujn oni devas venki ĉe tiel grandega organizo, komencinte de juristaj demandoj kaj finante ĉe teknikaj aferoj. **P. E. Ĝ. estas la pacverko, kiu al sam- kaj eksterlandanoj parolos, ke Polujo volas labori, ke Polujo scipovas labori.**

Ankoraŭ unu mencio: Ni aranĝis la Ekspozicion en Poznań. Ĝi estas facile komprenebla, ĉar la ĉefurbo de la ŝtato pro militaj okazintaĵoj ne taŭgis en ĉi momento solvi mil malfacilaĵojn, kiuj elkres-




Enirejo al P. E. Ĝ. flanke de ĉefa stacidomo.

kadis. Sed la Ekspozicio ne estas entrepreno de unu urbo, aŭ de unu landparto; ĝi estas la verko de tuta Polujo kaj en tio — laŭ mia opinio — estas ĝia plej grava morala tasko. La Ekspozicio influos je unuigo kaj kunigo de l' unuopaj landpartoj, dividitaj pro la longa mallibero, ĝi pruvos al ĉiuj, ke Polujo formas unu ne disrompeblan tutaĵon, ke ni kapablas bone mastrumi en nia propra hejmo.

**Dr Stanisław Wachowiak**
direktoro
de Pollanda Ekspozicio Ĝenerala.

# P. E. Ĝ. KAJ POLLANDA KONFERENCO ESP-A EN POZNAŃ.

Kiu ne vizitis ĝis nun nian Pollandan Ekspozicion, ne povas imagi, kiel instrua ĝi estas por ĉiu, kiu deziras ekkoni la progreson faritan dum deko da jaroj de la sendependo de nia lando. Mi vizitis multajn, multegajn ekspoziciojn dum mia vivo, sed ĝi apartenas al la plej instruaj kaj interesaj. Oni havas antaŭ si libron de la vivo de la popolo, aranĝitan en ĉiuj detaloj, ne nur lerte, sed oni devas aldoni, ke ĉiu kunlaborinto alportis ĉi-tien sian plej grandan fervoron kaj amon de la plenumita laboro, eĉ en prilaborado de plej malgrandaj detaloj. Oni povas juĝi kiom **granda estas en nia lando ne nur la deziro, sed efika penado por pacema**




Pavilono de Ministrejo de Poŝtoj kaj Telegrafoj en P. E. Ĝ.

**kunlaborado en ĉiuj rilatoj kun la tuta civilizita, kultura mondo.** Se iu ajn eksterlandano ankoraŭ ne scias pri ĝi, aŭ ne konas la situacion kaj ĝeneralan aspekton, bonvolu trarigardi malgrandan gvidfolieton ĉi-tie almetitan. (Vidu la gazeton Nr 7). Estas ja nepre necesa tia reciproka ekkono kaj alproksimiĝo de nacioj por la fina realigo de la pacideo. El tiu gvidfolio oni povas ankaŭ ekscii multajn plifaciligojn por la vojaĝo Polujon. Ĉiuj niaj gastoj estas bonvenantaj, kaj povos juĝi mem ke la vizito estas tre facila, ĉar la nutraĵo kaj loĝejo en Poznań estas tre malkostaj.

Tiu-ĉi jare P. E. D. kunvokis en Poznań okaze de la ekspozicio ankaŭ la ĉiujaran konferencon de pollandaj esperantistoj. Mi ne povas ankoraŭ prezenti la detalojn. La konferenco daŭris nur unu tagon, sekve oni ne povas esti tro postulema, sed oni povis konstati,

ke la espa afero konstante marŝas antaŭen en nia lando. Estis grava sukceso, ke dum tiom da diversaj kongresoj kaj konferencoj (entute estos pli ol 100 dum la daŭro de Ekspozicio), dank' al la klopodoj de nia eminenta samideano Prof. S. Nowakowski, Prof. de Poznana Universitato, ni sukcesis ricevi la ejon por la konferenco en la prelegejo de la Universitato. Estas ja grava faktoro, ke 20 Universitataj Profesoroj en Poznań estas aŭ esperantistoj aŭ simpatiuloj de nia movado.

Organiza prezidanto S-ro Prof. Nowakowski malfermis la konferencon proponante gvidanto Prof. O. Bujwid. Estis elektikaj Honoraj Prezidantoj: eminenta 98jara Univ. Prof. Benedykt Dybowski, mondkonata zoologisto kaj vojaĝinto, Univ. Rektoro Grochmalicki,



Palaco de Kulturo kaj Arto en P. E. Ĝ.

Pastro Cieszyński plej merita esperantisto en Poznań, kaj Univ. Prof. Lubieniecki. Prezidantoj: Univ. Prof. Ułaszyn, Dro L. Zamenhof, Pastro Janik, Prof. Czubryński, Dro E. Loth el Pabjanice, S-ro J. Kostecki, S-ro Dro Litauer (Warszawa), S-ino Cense, F-ino Lübeck (Estonio), Dro Fels (Lwów), Pruski (Lublin), Miernicki (Warszawa). Vicprezidantoj: Dro Broder (Katowice), S-ro Prengel (Bydgoszcz), S-ro Karolczyk (Warszawa), F-ino Weinstejnówna (Warszawa), F-ino Weinsberg, Dro Dreher (Kraków), Prof. Maske (Szamotuły).

Sekretarioj: S-roj Okoniewski, Maliszewski, Kotlicki, Tepper.

Prof. Bujwid tralegis kortuŝan salutleteron de la centjara maljunulo Samideano Dybowski el Lwów, forte aplaŭditan de la tuta ĉeestantaro.

Oni decidis sendi al li dankan telegramon.

Sekvis·laboraj kunsidoj de P. E. D. kaj de U. E. A. kaj proponoj, pri kiuj ni raportos en venonta numero.

Alvenintaj Samideanoj vigle vizitis la ekspozicion, kio ne malhelpis, ke ankoraŭ multaj ĉeestis la ferman kunsidon kaj partoprenis diskutojn dum pli ol tri horoj. **Bujwid.**

# PENSOJ PRI LA EKSPOZICIO.

Ekspozicio... Jen la magia vorto magnete altiranta al la urbo Poznań atenton de la tuta Polujo. Ĝi vokas!... kaj infanoj, plenkreskuloj, oficistoj, negocistoj, homoj apartenantaj al diversaj medioj de l' socio respondas al la alvoko kaj sekvas la vojdirekton al Poznań, al la Tutlanda Ĝenerala Ekspozicio, aranĝita okaze de la dekjara sendependeco de la Pola Ŝtato, kaj al la multenombraj vizitantoj fabele prezentiĝas la grandioza verko, konstruita dank' al klopodoj kaj penadoj ne de unuopaj personoj, sed de la tuta popolo.

Kiel la spegulo refraktas la radiojn de la suno, tiel la Ekspozicio estas fokuso, kie kuniĝas la radioj de kulturo, industrio, komerco, produktado kaj posedo de Polujo kaj kie respeguliĝas ĉiuj atingaĵoj, sukcesoj kaj progresoj, akiritaj dum ĝia senpendeca ekzistado.



Fragmento de Registara Palaco en P. E. Ĝ.

Vagonoj, lokomotivoj, aeroplanoj faritaj en la landaj produktejoj kantas potence feran kanton de l'progreso; pontoj, fervojoj, stacidomoj jam finkonstruitaj kaj konstruataj montras senrefute la fortan disvolviĝon de trafiko; ĉiam pli densiĝanta reto de diverspecaj lernejoj kaj klerigaj organizaĵoj pruvas la venkan triumfiron de la kulturo.

Ekspozicio estas kvazaŭ lernejo, kie oni povas trastudi ĉion rilatantan al la historio kaj stato de Polujo dum tiuj dek jaroj de la regna memstaro. — Bilde kaj frape ĝi ilustras la vivon kaj celadojn de Pollando nuntempa. — Ekspozicio estas imponal Montrante la maturon kaj vivkablon de la popolo, sukcesinta krei tian verkon en tre mallonga tempo; ĝi ankaŭ estos lumbriko en bela konstruaĵo de internacia paca kunlaborado kaj ĉenero en la ne disŝirebla ĉeno, kunligonta ĉiujn popolojn de la Mondo en „unu grandan rondon familian".

**I. Dratwer,** Warszawa.

# LA ĜENERALA LANDEKSPOZICIO.

(Impresoj).

Ĉitiujare nia Tutpola Kongreso, okazinta en Poznań, havis neordinaran atrakcion — la viziton al la P. E. Ĝ. Humorplenaj kaj gajaj (sed bedaŭrinde ne satdormintaj) niaj esperantistaj geamikoj pasigis la du festotagojn sur la vastegaj terenoj de P. E. Ĝ., admirante la grandiozan monumentan laboregon, kia estas tiu-ĉi nekutima Ekspozicio.

Kaj vere oni ne povis elekti pli konvenan urbon por nia ĉijara kongreso ol Poznań, kies nomo kuŝas nune sur ĉies lango. La impona ekspozicio estas ĉiurilate tiel interesa, ĝiaj vidindaĵoj — tiom multnombraj kaj variaj, ke neniel oni povas bedaŭri la viziton malgraŭ, ke ĝi forte lacigis ĉiujn.

Se oni konsideras, ke **la Ekspozicio havas ĉ. 110 pavilonojn,** el kiuj ĉiu aparte postulas almenaŭ 2 horojn (se — nature — vi ne volas fuŝvidi), komprenebliĝas, ke estas neeble en du tagoj viziti la tutan ekspozicion, aŭ eĉ ĝian pli gravan parton. Ĉiu do rapidis vidi tiujn pavilonojn, kiuj lin speciale interesis.

Mi ne celas ĉi-tie priskribi la ekspozicion, kies nur malgrandan parton mi vidis. Ĝian grandiozon oni apenaŭ povas priskribi. Vi devas mem ĝin vidi kaj admiri.

La P. E. Ĝ. estas monumento de kolektiva energio, monumento de Nacia Potenco. Ĝi estas revuo de ĉiuj noblaj agoj de la juna Pola Respubliko. Ĝi brilas per lumo de idealoj, kiujn la pola popolo semis en siajn ĉiutagajn penadojn, el kiuj elkreskis impona palaco de vera paca laboro.

La Pola Nacio ne povis pli bele en konkreta maniero festi la jubileon de sia dekjara sendependeco. Tiu-ĉi ekspozicio montras klare al ĉiu ĝia vizitanto, ke Pollando vivas kaj agas, ke en la nobla vetbatalo de la tuthomara laborado ĝi ne volas resti kaj ne restas inter la lastaj. P. E. Ĝ. manifestas al la tuta mondo la energion, persistemon kaj laborkapablon de la pola popolo, kiu denove pruvis, ke en volo kaj obstino kuŝas la potenco.

Kun kia diligenteco, kun kia pedanteco estas plenumita ĉiu eĉ la plej malgranda detalo de tiu-ĉi neimageble granda laborego! Sufiĉas ja ekrigardi — sur la unua tereno de la Ekspozicio — en la pavilonon de peza industrio, en tiun de metala aŭ en tiun de tekstila industrio! Impreso premas impreson, kaj viaj okuloj ne povas ĉirkaŭpreni ĉion. Fine vi eksentas vian atoman malgrandecon rilate al tiuj ĉi feraj gigantoj, kiujn kreis la kolektiva energio. Ilia grandiozo inundas viajn okulojn, kaj vi estas kaptita en beatan admiron, kiu ĉiuminute pli kaj pli kreskas ĝis ĝi fariĝas peano al Homa Laboro.

Pli ol homa laboro ĝi estas! La nur 10 jarojn resendependa Polujo ne iris, sed kuris antaŭen. Per „sepmejlaj" botoj ĝi kuregis, ne dezirante resti malantaŭe. Ĝi devis atingi la montrilon de la granda Horloĝo — de Evolucio, kiu en sia antaŭenirado dispremas la malfortulojn, nekapablajn sekvi ĝin. Kaj ĝi sukcesis.


**I. Lejzerowicz.**

# IMPRESOJ EL POZNAŃ'A KONGRESO DE ESPERANTO 29–30. JUNIO 1929.

Polaj esperantistoj intencis jam antaŭ du jaroj, ke en 1929, okaze de tutlanda ĝenerala ekspozicio, Universala Kongreso de Esperanto estu kunvokata al Poznań. Pro tio ni proponis ĉe la Danziga kongreso en kunsido de delegitoj de Koro kaj ICK okazigon de la kongreso 1929 en Poznań. Bedaŭrinde jam Budapest estis antaŭinta nin, kiel ni scias.

Ni devis kontentigi nin per landa kongreso kaj postkongreso, ambaŭ direktotaj al Poznań kun ties grandega ekspozicio.

La III. tutpollanda kongreso de Esperanto en Poznań ĵus okazis kaj ni nun ĝoje atendas la postkongresan ekskurson el Budapest al la Poznana Ekspozicio. Por ke la ekskursontoj sciu kial ili iros viziti la Ekspozicion, mi volas en kelkaj vortoj priskribi miajn impresojn el Poznań.



„Semanto", skulptaĵo de Marcin Rózka.

Bonege aranĝita akceptejo atendos la alvenantojn en la grandega stacidomo Poznana. Ĉies deziro pri loĝigo estas akurate plenumata, ĉar ĉiu kategorio de mendita loĝejo havas specialan oficiston. Mi estis mendinta unuaklasan privatan loĝejon kaj tuj turnis min al fako „Privataj loĝejoj I. klaso". En sliparo oni trovis mian nomon kaj adreson Poznanan kaj enmanigis al mi mian domŝlosilon. Per oportuna aŭtodroŝko mi post kelkaj minutoj estis en mia loĝejo, malgraŭ ke estis 4-a horo matene.

Post ioma dormo mi estis en la limoj de la Ekspozicio. Mi ĉeestis la gazetaran ekspozicion 1928 en Köln vojaĝe al la Antverpena kongreso. Ĝia grandegeco imponis min. Sed la vasteco de la Poznana superis miajn esperojn.

Plej bela sendube, laŭ tio kion mi povis en la daŭro de du tagoj vidi, estas la pavilono de amerikaj elmigrintoj kaj tiu de la gazetaro. Aparte vizitinda estas la t. n. Palmejo.

Pri refreŝigo kaj amuzo oni zorgis abunde. Kelkdeko da kafejoj kaj bierejoj, laktejoj kaj dolĉaĵejoj certe sufiĉas por pli ol du tagoj...

La forta radiosendilo agrable lulas vin, sidantan ĉe vespermanĝo en restoracio, ĝojlacan kaj en perfekta humoro...

Ne miru, ke vi vidos min ree en Poznań okaze de la postkongresa ekskurso al ties Ekspozicio. Dr. LEOPOLD DREHER.

# DEK JAROJ DA ŜTATA VIVO DE POLUJO.

Kiam post rigardado de multaj interesaj fakoj de la P. E. Ĝ. en Poznań, montrantaj la plej diversajn fakojn de vivo, pulsanta en Pola Respubliko, vi alvenas al la **grandega, impona konstruaĵo kun surskribo „Registara Palaco"**, vin kaptas ia dubsento:

— Verŝajne nenio interesinda. Ekspozicio de tedaj burokrataĵoj. Statistiko de leteroj, forsenditaj kaj ricevitaj en ĉiu vilaĝa regna oficejo aŭ similaj malsaĝaĵoj. Ni prefere restu for de tiu malvivaĵo, malsereniganta la vivon kaj enkateniganta ĝin per ordonoj, paragrafoj, malpermesoj kaj miloj da similaj aĉaĵoj.

Certe ĉiu el vi, karaj samideanoj kaj ĉarmaj samideaninoj, venantaj Ekspozicion por bone ekkoni la Zamenhofan kaj Esperantan patrujon, tiel pensos kaj kun malkotenta grimaceto deziras direkti viajn paŝojn aŭ paŝetojn (dependas de la sekso!) al io alia.

Permesu malgrau tio proponi al vi, ke ni tamen eniru tiun ejon de monstraĵoj. Nur por minuto. Ni jetos ja nur rigardon en tiun regnon de papero kaj tuj denove forkuros por ĝojplene libere ekspiri je freŝa aero kaj ĝui la belegan panoramon de la Ekspozicio, karesantan niajn okulojn.

Ni do eniru. Kuraĝe transpaŝu la sojlon.

Kaj nin ne timigas la „regnaj palacoj"
Nek montoj paperaj, nek tedo-minacoj...

Nun do, ni lasis la Rubikonon malantaŭ ni. Ni jam estas interne.

Kiu fako estas la unua, nin tedonta? „Ministerio de Publikaj Laboroj". Estu tiel! Ni rigardu tiujn teruraĵojn!



Halo de peza industrio en P. E. Ĝ.

Sed kio estas tio? Belaj plastikaj modeloj de pontoj, konstruitaj anstataŭ la neniigitaj per kanonegoj dum la terura mondmilito... Kaj tie-ĉi: novaj pontoj, antaŭe tute ne ekzistantaj... Kaj jen la multaj novaj ŝoseoj...

— Do ne nur sur papero, sed ankaŭ en efektiveco oni multon faras!

— Jes, kara samideanino. Vera miraklo, ĉu ne?

Kaj jen rigardu: la sanga mondmilito difektis, ruinigis multegon da homaj loĝejoj, tutajn vilaĝojn, urbojn kaj eĉ provincojn. Kiel Fenikso reviviĝis el cindro Polujo. Oni devis ĉion rekonstrui, ĉion denove fari de la komenco.

Kaj rigardu — ĝis la komenco de la nuna jaro dank' al helpo de la regno oni rekonstruis ĉirkaŭ 90 proc. de ĉiuj militruinigitaĵoj. La regno elspezis por tio tricentsep...

Pardonu, tre karaj samideaninoj kaj ne malpli amindaj samideanoj, mi tute forgesis, ke ciferoj estas timigantaj. Cetere... ni ja volis resti nur minuton en la „Registara Palaco" kaj tuj forkuri de tie. Ĉu ni do jam revenu?...

Kiel, ĉarmulino, vi diras, ke tiuj ŝajne tedaj aferoj, bonaj nur por distritaj (ne distremaj) universitataj profesoroj, estas tie-ĉi tiel interese, vive kaj eĉ alloge (singardeme fraŭlineto!) prezentitaj, ke vi volonte daŭrigos la vizitadon?

Ĉu vere?

Ni do iru pluen!

Sed, gesamideanoj, vi tro longe ĉion ĉirkaŭrigardas. Jam pli ol unu horon ni estas tie-ĉi kaj tamen ni ne finis ankoraŭ la vizitadon de la teretaĝo. Kaj ni ja havas ankoraŭ tiom da etaĝoj, ĉambregoj, ĉambroj kaj ĉambretoj en tiu-ĉi grandega ejo!

Rapidu do, rapidu, gesemideanoj! Alie, ni ne sukcesos. Bone, mi konsentas kun vi, ke en ĉiu anguleto estas interesindaĵoj, sed tamen, se ni volas vidi ĉion, ni devas rapidi...

Ni do kuru.

Kaj jen kvazaŭ en kinematografo ni vidas la tutan vivon de tiu grandega komunumo ŝtata, kiu kalkulas nur dek jarojn de sendependa vivado. Dek jarojn! Eteta, neperceptebla tempero en la mondhistorio! Kaj tamen atentu, kiaj vere mirindaj rezultoj estas atingitaj, rezultoj de persista laboro, de amo al la hejma lando. Ne de amo malsana, celanta per sango kaj glavo pligrandigi la hejmlandon kaj potencigi ĝin per subpremado de la aliaj. Sed de amo natura, amo de infano al la patrino, amo paca, noblanima, elkora.

Jen vidu: la infaneto-Polujo jam tuj post sia naskiĝo baraktis kun hereditaj malsanoj. Ĝia korpeto estis malfortika. La milito ruiniĝis ĉion. Tri partoj de Polujo estis antaŭe diverse regataj. Kiam Polujo restariĝis, minacis ĥaoso. Kio estis permesita en unu parto, estis kondamnata en la alia parto. Preskaŭ neeble estis ĉion unuigi, ordigi. Diversaj, multflankaj malfacilaĵoj en ĉiu medio de la vivo ekaperadis. Kaj same, kiel en la vivo de la homo plej danĝerplena estas la periodo infana, same ankaŭ la unuaj jaroj de la reakirita ŝtata sendependeco de Polujo estis plenplenaj de danĝeroj, ĉiumomente minacantaj mortigi la ŝtaton-infanon.



Bildo, prezentanta ĉefajn piedpilkludantojn de klubo Wisła (visŭa) el Kraków, pentrita de Vlastimil Hoffman kaj lokita en Palaco de Fizika Edukado en P. E. Ĝ.

Sed jen rigardu, kion interese, simple kaj facile montras al vi la apartaj fakoj de la Registara Palaco? La sekvoj de la milito iom post iom malaperas. Rekonstruiĝas la detruitaj domoj. Aperas novaj. Foriĝas la diferencoj juraj en apartaj partoj. Ekstaras nova, granda retaro da lernejoj. Klerigado faras grandan progreson. Industrio kaj komerco batalas kun malfacilaĵoj, sed sukcese venkas multajn barojn, kaŭzitajn cetere en la tuta mondo pro la malbenita mondmilito Ekaperas novaj, antaŭe plejparte nekonitaj institucioj de socia prizorgo kaj asekuro de laboro. Polujo pace kunlaboros en la Ligo de Nacioj kaj en la Internacia Laboroficejo, helpante tiel laŭpove ankaŭ al la komune-homara progreso.

Ni vagas senlace en la grandega „Registara Palaco", rigardas, observas ĉion kaj admiras la potencon de laboro. Potencon de laboro, faranta miraklojn, malgraŭ neeviteblaj eraroj kaj mankoj.

Sed jen estas jam vespera horo, oni baldaŭ ŝlosas la Palacon. Rapide ni eliru, kvankam ni ne finis ankoraŭ ĉion rigardi.

Vi volas morgaŭ ankoraŭ reveni tiun Palacon, karaj samideanoj kaj lacaj samideaninetoj, por daŭrigi la vizitadon.

Jes, vi estas pravaj. **Ĉar tie estas ekspoziciita io plej admirinda:**
**Viva historio de renaskita ŝtata organismo de Polujo!** **J. Ŝapiro.**

# OPINIOJ DE FREMDLANDAJ DIPLOMATOJ PRI P.E.Ĝ.

**Franca ambasadoro** ĉe pola registaro s-o Jules Laroche, reveninte post solena malfermo de P. E. Ĝ. al Warszawa, akceptis kelkajn ĵurnalistojn kaj en vigla interparolo priskribis siajn eksterordinare plusajn impresojn.

— **Miaj impresoj de P. E. Ĝ. estas bonegaj.** Plaĉis al mi ne nur eksponaĵoj mem, sed ankaŭ maniero de ilia prezentado, same interesa kiel pruvanta pri bongusteco de l' eksponantoj. Tio ĉi speciale rilatas teksaĵn eksponaĵojn, vere bonguste prezentitaĵn, kvankam aliaj branĉoj de industrio ankaŭ vekis intereson.

— Kun speciala aplaŭdo mi devas substreki, ke eĉ fakoj, kiuj pro sia karaktero estas prefere sekaj kaj monotonaj, scipovis tamen elokvente alparoli la gastojn. Mi pensas ĉi tie pri eksponaĵoj de l' registaro, de institucioj autonomiaj kaj de monopoloj. Desegnaĵoj grafikaj kaj ciferoj estis tiel klaraj kaj kompreneblaj por ĉiu, ke oni rigardis ilin kun granda intereso. Eĉ por personoj ne kutimaj orientiĝi en statistikaj datoj, ĉio estis tute klara. Agadon de institucioj aŭtonomiaj en sfero de lernejaro, higieno kaj produktato oni vidis kiel sur manplato. Mi devas mencii speciale pri fako de alkohola monopolo, kie ĝia produktado estis montrita simpladire bonege kun granda estetika sento. **Lerteco kaj gusto karakterizis eĉ la plej objektajn tabelojn kaj ciferarojn.**

— Koncerne al **privataj eksponaĵoj** ili plej elokvente **pruvas pri** riĉeco de Polujo kaj ĝia potenca industria disvolviĝo, estante samtempe **laŭda bilanco de unua jardeko de l' reviviĝinta Polujo.** Oni atingis belajn fruktojn, pruvon de granda kaj persista laboro, malgraŭ multaj malfacilaĵoj kaj malhelpoj.

— **Organizo kaj lerteco de l' aranĝoj estas perfekta.** Aŭtobusoj, specialaj tramoj, hoteloj preskaŭ antaŭ niaj okuloj konstruitaj — ĉio klopodas fari vizitadon de l' Eksp. kiom eble plej komforta.

...fine **mi esprimas ankoraŭ foje mian admiron al la organizintoj** de l' Eks. kun prez. Ratajski kaj dro Wachowiak kiel estroj.

Kaj jen opinioj de aliaj diplomatoj:

**Aŭstria sendito** s-o N. Post diras: Sur loko de ĉiujarai tiel amase vizitataj Poznań'aj foiroj aperis P. E. Ĝ. sur senkompare pli ampleksa teritorio. Per tre klara maniero ĝi prezentas ekonomian disvolvon de Polujo en unua jardeko de sia reviviĝo kaj donas al ĉiuj interesatoj la plej bonan okazon por trastudi riĉan disvolvon de ĉiaj ebloj de Polujo.

Sir William Forbes Erskine, **reprezentanto de Grand-Britujo** plenpova ministro en Warszawa deklaras:

— **Miaj impresoj de l' Eksp. estas eksterordinare bonaj.** La plej granda surprizo estis por mi plena pretigo de l' Eks. ĉar kutime eĉ plej zorge preparataj estas en tago de malfermo ankoraŭ ne kompletaj. **Precipe plaĉis al mi la pavilonoj mem,** konstruitaj harmonie kun tutaĵo, ankaŭ ĝardenoj kaj florbedoj. **Mi admiras universalecon de l' Eks. kaj ĝian ĉiufakecon.** Riĉe kaj interese prezentiĝas industria fako; mian atenton speciale kaptis la elektra. La Eksp. mi vizitos ankoraŭ foje.

**Reprezentanto de Bulgarujo,** s-o Vlodimiro Robev priskribas siajn impresojn jene:

**Mi ne havas vortojn por esprimi mian ravitecon pri P. E. Ĝ. Ĝi estas efektive io grandioza** kiel koncepto, aranĝo, organizo kaj kiel riĉeco de eksponaĵoj. **Ĝi estas** ankaŭ **ne renkontate bela sukceso de organizintoj** impona revuo de polaj atingaĵoj dum 10 jara sendependeco, de faritaj progresoj kaj fruktodona disvolviĝo en ĉiuj fakoj. **Mi vizitis la Eksp. kun crescanta ekstazo** unu pavilonon post la alia. Efiko: **la plej bona impreso** kaj neŝanĝebla decido reveni, eble, eĉ ne unu foje, por post tiu unua pli ĝenerala vizito oferi nun pli multe da tempo por enprofundiĝi en individuaj fakoj. La Eksp. — jen neelĉerpebla kampo por studoj por ĉiu, deziranta ekkoni tutaĵon de pola ŝtata, ekonomia kaj artista vivo. Fine **mi devas esprimi mian admiregon por pavilono de l' arto.** Mi alte taksas pentr — kaj skulptarton polan, tamen **tio, kion mi ekvidis superis miajn atendojn.** Unuvorte la Eksp. impresis min neforgeseble.

— S-o d-ro Venceslao Girsa, **ĉeĥoslovaka deputito,** tiel priskribas siajn impresojn:

— **La Eksp. estas** nerefuteble bela, ĉar sobra, objekta kaj **eksterordinare riĉa je eksponaĵoj** precipe el la fako de statistiko. Mi nenie rimarkis provojn aŭ penadojn plaĉiĝi facilmaniere, kiel tio kutime okazas ĉe ekspozicioj, kiuj estas prikalkulitaj nure por amuzo. La Eksp. havas seriozan karakteron, estas videble, ke ĝiaj iniciatintoj kaj direktantoj estas bonaj mastroj, kiuj ne scipovas pereigi laboron de individuo. Ĝi estas eksterordinare homogena laŭ estetik-arkitekta flanko. — Mi havis okazon rigardi preskaŭ ĉiujn pavilonojn kaj mi ne renkontis eĉ unu, kies strukturo farus sengustan impreson. Specialan substrekon meritas la fakto, ke **multajn kontruaĵojn oni starigis** pordaŭre, destinante ilin por certaj fiksaj celoj. Mi pensas ĉi tie pri pavilono de belartoj, kie poste estos lokita anatomia laborejo de l' Universitato. Por levo de estetika aspekto helpas **ĉie reganta modela ordo,** bonegaj trotuaroj kaj vojoj, multenombraj floroj kaj gazonoj.

Krom eksponaĵoj la **plej valora eble parto de l' Eksp. estas ĝia scienca parto.** Modeliloj de vojoj, havenoj, akva trafiko, plej diversaj diagramoj kunmetitaj laŭ statistika vidpunkto donas nekutime riĉan materialon por inĝeniero, instruisto, industriisto kaj agrikulturisto.

El unuopaj pavilonoj **imponas pro modela ordo la ŝtata domego.** Krom tiu **estas speciale rimarkinda Palaco de l' arto,** pripensita kaj aranĝita tiel modele, ke ĉiu, kiu interesiĝas pri la stato kaj disvolviĝo de pola arto, havas bonegan kaj klaran bildon. Tre interesa kaj ĉiuflankeca estas ankaŭ pavilono „Polujo eksterlande".

...ĉiu interesiĝanta pri Polujo trovos en P. E. Ĝ. ĉion, kio estas necesa por formi al si precizan bildon pri tiu ŝtato.

S-o Niels Johan Wulfsberg Host, **dana** plenpova **ministro,** eminenta konanto de belartoj diras: **Miaj impresoj estis potencaj. Mi estis simpladire mirigita,** konvinkiĝinte kiel multe da energio kaj kun kia organiza talento oni konstruis dum tiel mallonga tempo urbon en la urbo. La tuta organizo funkciis dum nia ĉeesto ekstеordinare precize. **Mirega estas brila progreso farita de Polujo,** videbligita en ĝiaj atingaĵoj. Ŝtata fako estas efektive impona. Kun granda intereso mi rigardis eksponaĵojn ilustrantajn kreon de pola komerca ŝiparo kaj de haveno en Gdynia. Samtempe mi devas esprimi mian aplaŭdon por via bongusto. **Speciale priskribinda estas belarta fako.** Mi ne povis min deŝiri de tiu pavilono, **kiu entenas grandvalorajn verkojn.** Ĝi pruvas, ke Poloj posedas multe da artista spirito. Mi certe ankoraŭ ne unu foje venos al Poznań, por viziti P. E. Ĝ.

**Finlanda sendito,** s-o d-ro Idman parolas: La Eksp. prezentiĝas tre interese. **Kun admiro kaj mirigiteco oni vidas tiom da eksponaĵoj.** Ne nur la nombro de eksponitaj varoj kartoj kaj statistikaj tabeloj **vekas ravon.** Oni devas gratuli al organizintoj de l' Eksp., kiuj sukcesis doni ĉiuflanke tre indan kaj allogan formom, dank' al kiu la okulo povas ĝui belan vidon. Sendube la Eksp. estos **granda sukceso.** Oni povas esti certa, ke ĝin vizitos ne nur multenombraj aroj de Poloj, sed mi estas konvinkita, ke ankaŭ fremduloj ne preterpasos la okazon viziti Polujon por orientiĝi pri ĝia lerteco. Tiaj vizitoj estas la faktoro plifortiĝanta amikajn rilatojn inter landoj. — Organizo de l' Eksp. bezonis grandegajn kostojn kaj postulis individuan fortostreĉon flanke de direktantoj, tamen ili havas plezuron, verkinte elokventan esprimon de pola produktado kaj patriotismo.

S-o Georgo Lagudakis, **greka reprezentanto** kaj plenpova ministro parolis:

Mia, bedaŭrinde, mallonga vizito bonege tamen min impresis. Cetere mi estis certa, ke pola patriotismo kaj pola ambicio, reprezentos dum la Eksp. aĵojn indajn laboremon kaj inteligentecon de pola nacio. Tamen **tio, kion mi ekvidis estis por mi la plej agrabla surprizo** kompare kun aliaj ekspozicioj kaj foiroj, kiujn mi havis okazon viziti dum mia longa politika kariero. **Organizintoj de l' Eksp. atingis,** se temas pri maniero de prezentado de eksponaĵoj, **supron de perfekteco,** meritante plej sincerajn gratulojn kaj laŭdojn. Speciale substrekinde estas, ke oni konstruis ion fiksan ne trapasantan, kio fariĝos rememoraĵo de Eksp. por kultura profito de l' lando, nome: konstruo de nova urbkvartalo, stariginte belajn domegojn, kiuj estas pruvo de praktika kaj kultur-progresa sento, ĉar tiuj ĉiuj konstruaĵoj estos eluzitaj por edukado de nova generacio.

**Mankas al mi vortoj por esprimi mian ravitecon pri fako de belartoj, kiu entenas verkojn simpladire miraklajn.** Ĝi meritas vastan priparolon, eminente

trapasantan kadrojn de jenaj ĝeneralaj impresoj. Registara fako meritas ankaŭ specialan distingon, ĉar ĝi estas respegulo de landa progreso en administra sfero. **Pedanta precizeco kaj akurateco** de ĉi fako **estas,** dirante senpartie, **imponaj.**

Ĉiu pensanta homo kaj kapabla prezenti al si precizan laboron kaj grandiozecon de efikoj de P. E. Ĝ. povas rigardinte ĝin, enfermi tutaĵon de siaj impresoj en unu elokventa kaj forta vorto „brave!"

**Hispana sendito** s-o Silv. F. Vallin diras: Mi veturis al Poznań kun vera plezuro por rigardi P. E. Ĝ. Mi tute ne estas surprizita pro fortorstreĉo, kiun ĝi prezentas, ĉar mi konas bonege vivecon de pola nacio, ĝian grandan agemon kaj fortan volon, enkorpiĝintan en deklaro: „Ni estas".

Kvankam malbona vetero ne permesis al mi precize orientiĝi en ĉiuj detaloj de l' Eksp., malgraŭ tio mi sukcesis rimarki grandan valoron, kiun posedas antaŭ ĉio agrikultura fako kaj tiu de metala industrio. **Mi profitas la okazon por esprimi mian plej altan admiron pro ordo kaj bonega organizo,** kiujn oni povas doni kiel ekzemplon en aliaj similaj okazoj.

S-o Guglielmo Rulli Cito, **reprezentanto de Italujo** esprimas sian admiron jene:

**La Eksp. estas pruvo de eksterordinara produkta taŭgeco de l' lando.** Polujo prezentis en ĝi fruktojn de dekjara laboro en periodo de sendependo. La vojo, kiun oni sukcesis trapaŝi dum tiel mallonga tempo, estas admirinda. **Impona spektaklo,** kiun donas revuo de pola laboro en P. E. Ĝ., estas eminenta demonstracio de poluja viveco; tiu ĉi montro estas ankaŭ horoskopo de grandioza estonteco, kiu Polujon atendas. **Genia organizo de l' Eksp.** faras ĝin unu el plej interesaj imprezoj, kiun en ĉi fako oni povas rigardi en Eŭropo.

**Japana sendito** s-o St. Matushima deklaras: La Eksp. montras energie da tutan politikan, ekonomian kaj kulturan agadon, kiun Polujo scipovis disvolvi dum la lastaj dek jaroj de sia libero. Ĝi rememorigos laŭdindan pasintecon de Polujo, atestas la progreson, atingitan ĝis nun en tuta ĝia nacia vivo kaj **permesas profeti al ĝi brilan estontecon.** Tial estas evidente, ke la Eksp. ludos tre gravan rolon, helpante ne nur plifortigi rilatojn inter ĉiuj landpartoj, sed ankaŭ pliproksimiĝi al eksterlando.

Plenpova ministro kaj **sendito de Jugoslavujo,** s-o Branko Lazareviĉ deklaras pri P. E. Ĝ. jene:

**Imponas min konstruaj kapabloj de Poloj,** kiuj dum la lasta jardeko sukcesis fari tian fortostreĉon. Admirinde estas, ke ĝi estas perlaboraĵo nur de unu generacio. Se temas pri ĝenerala impreso de Eksp. do antaŭ ĉio **estas rimarkinda amerika svingforto.** Kuraĝe mi povas uzi „amerika", ĉar mi loĝis en Usono dum preskaŭ kvin jaroj. La Eksp. estas respegulo de ekonomia forto de Polujo, kiu ĉerpas siajn sukojn el profundo de polaj animoj.

Se temus pri laŭgradigo de personaj impresoj, sur la unua loko mi starigus revuon de agrikultura produktado, apud ĝi pavilonojn de peza industrio. Fine neeble ne esprimi plej korajn vortojn de **laŭdo por pavilonoj de arto,** kiuj pro retrospektiva prezento formas eksterordinare valoran dokumenton por ekkoni malnovan kulturon de l' nacio.

**Reprezentanto de Norvegujo,** s-o Chr. Ditleff deklaras: **Inter ĉiuj imponaj motriloj de P. E. Ĝ. fako de moderna pentrarto estis por mi plej admirinda.** Mi atendis, ke en ĉiuj aliaj branĉoj de homa laboro mi ekvidos pruvojn pri **grandioza progreso** de renaskita Polujo kaj tion mi povis facile konstati en Poznań. Sed, vere, mi ne sciis, ke vi posedas tian vicon de pentristoj, kies **verkoj permesas profeti,** laŭ mia modesta opinio, **eminentan estontecon de pola arto.** Mi ne povas min deteni esprimi la plej korajn gratulojn de forto, inklino kaj rimedoj por ĉiam pli alta grimpado al vojo de via riĉa kaj nobela penado.

**Reprezentanto de Portugalujo,** vic-konsulo s-o P. Calogeras diras: P. E. Ĝ. estas prezento de ĉiuj laboroj, ĉiuj fortosteĉoj kaj grandioza pruvo de patriotismo de pola nacio.

**Svisa sendito** s-o St. de Segesser konfesas: **P. E. Ĝ. frapas antaŭ ĉio pro sia bonega organizo,** siaj belaj kaj vastaj konstruaĵoj. Ĝi estas ankaŭ **grandioza kaj potenca manifesto** de tio, kion Polujo dum jardeko de sia sendependeco suk-

cesis atingi en ĉiuj sferoj de sia laboro, kaj precipe en sfero de agrikulturo, industrio, metio, kulturo kaj arto. Tio, kion la Eksp. prezentas al vizitantoj **alportas honoron al ĝiaj organizintoj** kaj al la pola nacio, kies energion kaj laboron ĝi prezentas.

S-o H. Washi Menteŝ Zade, **turka charge d' affaires** entuziasmiĝas pri la Eksp.: Mi sentas profundan admiron kaj estimon por la pola nacio. Tiu **grandioza verko**, reprezentanta nuntempan Polujon en tutaĵo de ĝia nacia agado **efektive indas nian jarcenton.** En ĝi estas videbla ŝprucanta fonto de la plej fruktodona energio, de la plej disvolvita organiza sento kaj **brilanta esprimo de estetika nacia genio kun granda kulturo.** Per P. E. G. Poloj pruvis ne nur altan gradon de perfekteco en tuta sia materia kaj spirita produktado, sed ankaŭ montris, ke ili distingiĝas en arto gajni por si intereson kaj amon flanke de aliaj nacioj.

S-o J. Webb Beaton, **Usona reprezentanto** kaj usona chargé d' affaires ad interim parolas:

**P. E. G. estas ŝatinda pruvo de ekonomia kaj industria progreso,** farita de Polujo dum pasinta jardeko. Speciale feliĉa estis elekto de Poznań al la Eksp. Sinceran estimon meritas organizintoj de l' Eksp. pro la sukceso, kiun ili atingis, arigante tian reprezentindan kolekton de arto kaj landa industrio. Diversspecaj eksponaĵoj, lokitaj en modernaj pavilonoj kaj atrakcie pretigitaj por ekspoziciaj celoj, sendube venigos ĉi-somere multajn gastojn. Inter ili troviĝos nombraj fremduloj, kiuj povos proprokule konvinkiĝi pri kultura, ekonomia kaj industria grandeco de Polujo... Mi profitas la okazon gratuli al la Eksp. bonprosperon, kiun ĝi ĝuste meritas.

**Ni devas limigi nin al enpreso nur de tiuj ĉi opinioj, ĉar estas teknike neeble plilongigi ilian vicon.**

Kompilis **Tad. Hodakowski.**

# MISS ESPERANTO.

(kanteto kabareta okaze de la elektota „fraŭlino Esperanto" dum la XXI. Melodio de **„Mi kisas manon ho, madam'"!).**

I

(kantas unu voĉo)

Ho, belulino! — kongresreĝino!...
„Miss Esperanto" sonas — kiel kanto.
Do mi prikantas vin plejadore,
Sopiras mi kaj amenuas kore.
Vi estos, belulino, ĝis
Venonta jaro — nia „miss" —
Mi kisas manon, ho, fraŭlin'! —
Reĝino nia laŭ destin'! —
Kapkline antaŭ via kron' —
Postulas ĝin bonton'...
Kaj nutras min espero jam,
Reĝino per aklam'! —
Ke, se la kor' provokos min,
Vi ne protestos, ho fraŭlin'! —
Anstataŭ mano kisos mi
La buŝon kun pasi'!...

II

(multaj voĉoj — kongresontoj)

Vizaĝo bela — animo hela.
Vizaĝo nura estas ja sencela...
Beleco igas, al bon' devigas,
La korpon belan kun bonkoro ligas.
La sort' favora kronis vin,
Kongresa faris vin reĝin'...
Ni kisas manon, ho fraŭlin',
Reĝino nia laŭ destin'.
(k. t. p. kiel supre kun
**ŝanĝo mi per ni).** **Fez.**

# LASTAJ INFORMOJ PRI KONGRESO EN BUDAPEST.

**Sen Wien'a kaj Budapest'a kongreskarto neniaj rabatoj!**

Ĉe veturo al Wien oni ricevos, montrante ĉe aŭstr. limo la Wien'an kongreskarton, **senpagan aŭstr. vizon kaj 25 proc. fervojrabaton.** Posedante la Budapest'an kongreskarton, oni ricevos **25 proc. rab. sur Danubaj ŝipoj** kaj liberan envojaĝon al Hungarujo, poste en Budapest **50 proc rab. hungaran vizon. Kongresanoj el Polujo do ne devas klopodi pri aŭstria kaj hungara vizoj sed nur pri travojaĝa ĉeĥoslovaka.** Ĉe reveturo oni ricevos **50 proc. rab. je hungaraj fervojoj**, montrante la kongreskarton.

**Ĉiuj kongresanoj el Polujo ricevos 50 proc. rabaton sur polaj fervojoj ĉe reveno; specialaj dokumentoj por ĝui la rabaton, ricevos ĉiu de subskribito dum la Kongreso.**

Postkongreso okazos en Praha (v. N-o VI. de „Pola Esperantisto").

**Oni organizos postkongresan vojaĝon el Budapest al Poznań, por viziti la Pollandan Ekspozicion Ĝeneralan. Partoprenu ĝin multmombre!**

**Estos organizita karavano al Wien.**

**La karavano forveturos per rapidtrajno el Kraków la 28 de julio k. j. je la 8-h vesp. Por rezervi lokon, oni petas anonci sin plej malfrue la 23 de julio laŭ jena adreso:**

**Ludwik Kutscher, Kraków, Grodzka 9.**

# INTERNACIA KONGRESO POR KOMERCA KLERIGADO AMSTERDAM, 2—5 SEPTEMBRO 1929.

De l' 2—5 septembro 1929 okazos en Amsterdam la Kongreso de la Internacia Asocio por Komerca Klerigado.

En la antaŭa kongreso de l' organizacio en Zürich (1927) oni jam parolis pri nia lingvo kaj nia korespondanto s-ro Dro Vogt, Stuttgart, vicprezidanto de GEA, havis okazon varme pledi por Esperanto. Kiel sekvo al tio estis farita decido diskuti la problemon de la mondhelplingvo en la proksima kongreso, okazonta nun en Amsterdam.

Konsiderante la gravecon de tiu ĉi asocio, formita de eminentaj fakuloj kaj interesitaj praktikistoj kaj subtenata de kelkaj nac. organizacioj komercaj, ministerioj ktp., I. C. K. decidis fari efikan propagandon en tiu ĉi kongreso por Esperanto. La detaloj estas preparataj de nia komitato.

Niaj preparoj tamen promesos sukceson nur, se ĉiuj naciaj asocioj kaj aktivuloj helpos al ni. Estas necese, ke al tiu ĉi kongreso nepre ĉeestu multaj samideanoj aŭ protektantoj de Esperanto (eĉ ne parolantaj nian lingvon) por helpi en la defendo kaj diskuto de nia tezo. Ni jam petis la kunlaboron de la Nederlanda Esp. Unuiĝo „LEEN". Necesas ankaŭ, ke precipe la najbaraj societoj esperantistaj instigu sian membraron ĉeesti tiun kongreson. Dezirinde estas, laŭpove doni subvencion por faciligi la aliĝon. La tuta kosto estas 18 sv. frk. (kongres-kotizo 12 sv. frk., membro al la Intern. Asocio (deviga) 6 sv. frk.). Nur membroj de la Asocio rajtas partopreni en la diskutoj.

Ni petas la naciajn societojn informi nin **ĝis plej malfrue la 15 aŭgusto** pri tio, kion ili povis entrepreni kaj sciigi al ni eventuale nomon kaj adreson de la personoj, kiuj promesis iri aŭ havas la intencon iri al Amsterdam.

Fine ni rekomendas al ĉiuj la legadon de la artikolo de Dro Vogt, en „Esperanto" de junio 1929.

Atendante pri via tuta helpo en tiu ĉi grava entreprenado, ni sendas al vi niajn plej samideanojn salutojn.

INTERNACIA CENTRA KOMITATO
de la Esperanto-Movado
**Rob. Kreuz**
Ĝenerala sekretario.

# PEDAGOGIA KONGRESO — HELSINGÖR (DANLANDO) 8—21 AŬGUSTO 1929.

Krom la pedagogia kongreso en Ĝenevo okazas la 5a Mondkonferenco de la Asocio por Nova Edukado en Helsingör (Danlando). Tiuj samideanoj, kiuj povos nek iri al Budapest, nek al Ĝenevo povos eventuale ĉeesti tiun ĉi konferencon por ebligi bonan propagandon por Esperanto. Estas decidite formi diskutgrupon en Esperanto en tiu ĉi kongreso.

Ni petas la Nac. Societojn alvoki por efika partopreno en tiu ĉi kongreso.

La Tutmonda Asocio de Ge-instruistoj Esperantistaj (TAGE) faris energian klopodadon, por ke ni tie estu bone reprezentataj. De la sukceso de tiu ĉi speciala propagando multe sendube dependos por nia estonta laboro en rondoj de instruistoj.

INTERNACIA CENTRA KOMITATO
de la Esperanto-Movado
**Rob. Kreuz**
Ĝenerala sekretario.

# OD REDAKCJI.

Niniejszy numer **poświęcony jest specjalnie Powszechnej Wystawie Krajowej w Poznaniu.** Rozdawany on będzie **bezpłatnie** wraz z ilustrowanym dodatkiem P. W. K. podczas „Antaŭkongreso" we Wiedniu, na kongresie w Budapeszcie i ewentualnie na „Postkongreso" w Pradze. Zwracamy się do wszystkich polskich czytelników, by zechcieli osobistem wystąpieniem oraz w korespondencji z zagranicą zachęcić do zwiedzenia Wystawy.

**W najbliższym numerze P. E. rozpoczynamy druk dodatku do polsko-esp. części słownika Grabowskiego.** Zwracamy się **z gorącym apelem** do wszystkich naszych Czytelników **o nadsyłanie przyczynków** do tej pracy. Niemal każdy Esperantysta ma jakieś notatki, które mogą nam oddać znakomitą usługę w kompletowaniu materjału. Przyjmiemy bardzo chętnie zbiory złożone chociażby z kilkunastu wyrazów. **Niech się nikt od tego nie usuwa! Ułatwcie nam pracę, którą przedsiębierzemy dla wspólnego dobra!** Materjał, ułożony według porządku alfabetycznego wyrazów polskich, prosimy nadsyłać **jak najrychlej** pod adresem: W. P. **Józef Orzech,** Szkoła, Muszyna. Adres ten obowiązuje do końca sierpnia. Po tym terminie należy adresować: W. P. **J. Orzech,** dyrektor II gimnazjum państwowego w Tarnowie.

Jeżeli ktoś posiada liczny zbiór dodatkowych wyrazów i w najbliższych dniach nie mógłby tegoż w całości uporządkować, niech nadeśle przynajmniej wyrazy zaczynające się w języku polskim na początkowe litery (a, b, c, d, e, f, g, h, i, j, k, l), a resztę **w możliwie krótkim czasie.**

Ze względu na bardzo trudne warunki wydawnicze jest rzeczą wątpliwą czy wydamy osobną odbitkę tych uzupełnień do słownika — wobec tego **zwracamy się z gorącą zachętą do Sz. Czytelników, by zechcieli jak najliczniej zaabonować obecnie P. E.,** umożliwiając sobie w ten sposób skompletowanie słownika. Uzupełnienia te będą drukowane tak, jak „Vera historio de Don Juan".

**VENONTA NUMERO DE P. E. APEROS DUM SEPTEMBRO EN DUOBLA AMPLEKSO.**

**Red.**

Drukarnia L. Gronusia i S-ki w Krakowie, Stolarska 6. Telefon 1018.

# ĈEFAJ VIDINDAJ URBOJ EN POLUJO.

## KRAKÓW.

Kraków, laŭ legendo fondita ĉirkaŭ la jaro 700 p. Kr. apartenas al la plej malnovaj urboj de Polujo; karakteriza pro malnova kulturo. El multegaj vidindaĵoj ni citas nur jenajn:

Ĉefplaco kun **Draphalo** (Sukiennice) kaj **Nacia Muzeo**, preĝejoj de **S-a Mario**, S-a Barbaro, S-a Adalberto, Monumento de **Adam Mickiewicz** kaj Urbodomo.

Preĝejoj de S-a Petro, S-a Andreo kaj S-a Egidio.

**Wawel**: Monumento de Tadeo Kościuszko, **Katedralo**, Katakomboj de Polaj Reĝoj, Trezorejo, Reĝa Kastelo kaj legenda „Smocza Jama" (Draka Kaverno). Privataj apartamentoj de Prezidanto de la Respubliko kaj Etnografia Muzeo.

Preĝejoj de Bernardanoj kaj Misiistoj, S-a Miĥaelo, S-a Katarino, S-a Triunuo kaj de la Kristkorpo. Malnova Sinagogo.

**Muzeo de Czapski'j.** Universitato: Collegium majus (nomata ankaŭ **Jagellona Biblioteko**), arĥeologia Muzeo.

Muzeo de Belaj Artoj, preĝejo de S-a Johano, **muzeo de princoj Czartoryski**, pordego de S-a Floriano. Barbakano. Akademio de Belaj Artoj. **Monumento de Vladislao Jagiełło.**

Urba Teatro. Preĝejo de S-a Kruco. Urba Muzeo teĥnika — industria. Preĝejoj de Franciskanoj kaj Dominikanoj.

Magistrato. Palaco de Gazetaro.

## LWÓW.

Lwów, fondita ĉirkaŭ la j. 1250. estas la plej merita urbo en gardado de orientaj limoj de la Respubliko. Hodiaŭ ĝi povas esti nombrata en vico de pli gravaj eŭropaj urboj. La vidindaĵoj estas:

Katedralo rom.-katolika kun Kapelo de Boimoj. Katedralo armen.-katolika kaj grek.-katolika de S-a Georgo. Preĝejoj de Jezuitoj, Dia Korpo de Dominikanoj kaj m. a. Malnova ĉefepiskopa palaco. Urbdomo.

Universitato. Politeknika Altlernejo. Urba Muzeo de Artindustrio kun Urba Artgalerio. Naturhistoria **Muzeo de Dzieduszycki.** Nacia Instituto de Ossoliński. Urba Arĥivo. Muzeo, fondaĵo de princa familio Lubomirski. **Racławica Panoramo.**

Monumentoj de Johano Sobieski, Adamo Mickiewicz, Kiliński, Aleksandro grafo Fredro kaj Jabłonowski. Urba Teatro.

## POZNAŃ.

Poznań, la urbo de nunjara **Pollanda Ekspozicio Generala**, estas ankaŭ unu el malnovaj urboj de la Respubliko kaj post Kraków la plej vidinda urbo, precipe pro jenaj konstruaĵoj:

**Urbodomo**, post Wawel (en Kraków) la plej bela baroka konstruaĵo en Pollando. Kastelo de Przemysław. Universitato. Granda Teatro.

Preĝejoj de S-a Marcin, S-a Mario, Dikorpo, Franciskanoj, Bernardanoj, S-a Adalberto. Katedralo.

Muzeo de Societo de Sciencamikoj, Grandpoluja Muzeo, Milita Muzeo. Biblioteko de Raczyński.

Monumentoj de Johano Kochanowski kaj Adamo Mickiewicz.

Zoologia kaj Botanika Gardenoj.

## WARSZAWA.

Warszawa, ĉefurbo de Pollando, fondita en XIII jarc., estas nuntempe unu el plej grandaj urboj de Eŭropo. Sidejo de prezidanto de Respubliko, sejmo, ministerioj kaj aliaj centraj aŭtoritatoj. El altlernoj ĝi havas Universitaton, Politeknikon, Superan Komercan Lernejon, Superan Lernejon de Agrikulturo, Lernejon de Politikaj Sciencoj, Liberan Polan Universitaton kaj Muzikan Konservatorion. Krom tio vidindaj estas: Reĝa Kastelo. Katedralo de S-a Johano. Preĝejoj de S-a Spirito, S-a Jacek, S-a Kazimiro, S-a Kruco, S-a Aleksandro, S-a Mario k. a.

Muzeoj: Nacia kaj Milita, Pedagogia, Etnografi-naturscienca, Zoologia, de Belartoj. Teatroj: Nacia, Pola kaj Granda. Universitata Biblioteko. Arĥivo de Malnovaj Dokumentoj.

Monumentoj de Adamo Mickiewicz, de Kopernik, de princo Jozefo Poniatowski kaj de „Dankemo al Ameriko". Aleo kaj parko Ujazdowski. Parko Łazienki. Botanika Gardeno.

## WILNO.

Wilno, konstruita en 1320 j., estas situita meze de tre pentrinda ĉirkaŭaĵo. Ĝi enhavas ankaŭ multajn kaj belajn arĥitekturajn memorindaĵojn. Ci-tie estas vidindaj:

Pordego Ostrobrama. Urbodoma placo kun urbodomo. Pentrindaj: Kastela Monto kaj Monto de Tri Krucoj. Preĝejoj de S-a Tereso, S-a Trio, S-a Kazimiro, S-a Miĥaelo, S-a Anno, S-a Petro kaj Paŭlo, S-a Kruco; Katedralo de S-a Stanislao.

Universitato. Muzeo de Scienco kaj Artoj.

Pola Teatro. Botanika Gardeno.

## ZAKOPANE.

La suda limo de Pollando estas montaro Karpaty, kies la plej alta kaj plej vidinda parto estas granita montaro Tatry. La ĉefurbo de Tatroj estas Zakopane, turista vintra kaj somera rezidejo de Pollando. En la urbo ni povas viziti i. a.: Tatran Muzeon de Dro Chałubiński kaj domon de Pola Tatra Societo, konstruitan en pure tatra stilo. Krom tio ni vidas la monumentojn de Vladislao Jagiello kaj de Dro Chalubinski. Belegaj ekskursoj povas esti farataj al la montpinto Gewont, al la fonteto Siklawica, valo Strążyska kaj Kościeliska, lago „Morskie Oko" (Marokulo) kuŝanta inter tre pentrindaj montoj, krome valo Hala Gąsienicowa, lago Czarny Staw Gąsienicowy kaj akvofalo Siklawica. La plej bela monto de polaj Tatroj estas sendube Świnica (2.300 m.); sed ne malpli belaj estas montpintoj Czerwone Wierchy (2.100 m.) kaj Rysy (2.500 m.). Krom Tatroj estas vizitinda la kalkŝtona montraro Pieniny, kie oni trairas pitoreskan parton nomatan „Pola Svisujo". La plej alta montpinto de Pieniny estas Trzy Korony (Tri Kronoj) (987 m.).